

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaja Letero de Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj
NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

auto 9/01/2012 Dudekkvara Eldono 2012 04/01/2012 SENDITA

Tiu ĉi letero havas "hiperligiloj" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, informojn al Roger rspring@tpg.com.au; kaj kopiojn al Ivan ivan@melburno.org.au;

La Informa kaj noma paĝoj nur aperos je la dekaj kaj dekkvinaj eldonoj

Mi decidis daŭri la sekvantajn nombrojn je "Aŭstraliaj Esperantistoj" sen rompe tra la jaroj 2012 ktp.

Mi trovis en "TajpiSkripto" la sekvantan informon.. (inter mult-aliajn)

Vidu [Tajpi - Installation](#) ctrl+click to follow link

Parto de instruo de "tajpi"

Konvertas la elektitan tekston de X-sistemo al supersignaj esperantaj literoj.

ssigi_elektitan Uzeblas en tekstkampoj aŭ ajna tekstredaktilo kiel Word aŭ Notepad.

Konvertas la tekston en la tondujo de X-sistemo al supersignaj esperantaj literoj.

ssigi_tondujon

Konvertas supersignajn literojn en la elektita teksto al X-sistemo.

xigi_elektitan

Konvertas supersignajn literojn en teksto en la tondujo al X-sistemo.

xigi_tondujon

Mi ne estas sufiĉa lerta por kompreni la metodon aŭ facile fari. Por mi la unua kolumo estas enigma Eble iu de vi povus helpi nin kiel funkciigi ĝin

Ĉu estas* interŝanĝŝlosilo inter X kaj Supersigna tajpado??

En la aviadilo de Hong Kong kaj

Wuhan la anoncoj estas dulingve angle kaj ĉine.

La aviadilo en havis multajn ĉinojn kaj du denaskajn anglajn parolantojn. Mi kaj la piloto.

Mi estas tre feliĉa ke mi estas de naska angla parolanto

Lingvaj problemoj apartenas al la fremduloj, ne anglaj denaskaj.



Kara Roger,
Ĉu vi bone alvenis en Ĉinio?
Kio estas novjara rezolucio? vidu bildon.

Amike, Nicole
<nicole@cryogenic.net>

Kara Roger,

Saluton! Mi esperas ke vi kaj Mei ĝuis vian vojaĝon al Ĉinio kaj vi ambaŭ nun estas kontenta en via dua hejmlando.

Dankon pro presi la longan anoncon pri La Aŭstralia Esperanto-Kongreso 2012. Ene de ĝi, je la lundo okazos la jaran konvenon de AEA. Post ĝi vi demandis "Kiam kaj kie estos la elekto de la AEA Estro?" Ne estas Estro de AEA, sed Estraro, kiu gvidas gxin kaj la Estraro havas Prezidanton kaj ses Direktorojn.

Laŭ la konstitucio de AEA ĉiuj du jaroj



okazos voĉdonan elekton de la tuta estraro. 2012 estas voĉdona jaro. Ĝi estos anoncita du monatoj antaux la Jara Kunveno kaj la elekto okazos poŝte, kiel ĉiuj financaj membroj de AEA havas egalan ŝancon por kandidatiĝi kaj voĉdoni por ĉiuj, kiuj ili volas elekti. Do, la rezultojn de la poŝta elekto estos anoncita ĉe Jara Kunveno de AEA je la 1a de oktobro, 2012, ĉe Brisbano.

Amikajn bondezirojn,

Dianne Lukes <diannelukes@yahoo.com>

Dankon, Roger, pro viaj diversaj ĝisdatigoj.

Ĉion bonan en 2012!

Humphrey Tonkin <tonkin@hartford.edu>

Diano demandis min fari renkontiĝon en E-Domo. Temo estas AEA kaj> Pasporta Servo. Mi anonsis ĝin cxi-tie:

> <http://www.meetup.com/Esperanto-in-Sydney/events/45644582/>

Sabato 7 januaro 12 tagmeze

Amike dimitry lushnikov dimlush@gmail.com>

Mesaĝo de

osiaka@mua.biglobe.ne.jp pri Internaca Virina Tago 2012 – petata estas mesaĝoj pri tiu grava dato.

Mallonge, la grupo en Hiroŝimo skribas:

"Ni bezonas nek nuklean armilojn nek nukleajn centralojn. Ni bezonas pacon kaj puran mondon"

Se vi volas subtenan tiun gravan aferon, skribu al: osiaka@mus.biglobe.ne.jp kaj aldonu vian nomon, sekson, aĝon (se eble), profesion, loĝlokon(urbonomo), landon

Maksimume sur unueterapero A-4 formata. Ankaŭ viroj rajtas skribi!

Ili esperas ricevi bonajn mesaĝojn antaŭ la 5an de Februaro.

Margaret nsw@esperanto.org.au

Dum 3 monatoj mi loĝas en Wuhan kiu havas loĝantaron de 10 milionoj, Ne granda urbo ĉe Ĉino Mi eniris la aviadilon kaj Sidnejo havis 22 gradojn. Mi alvenis Wuhan je 2 gradoj tre malvarma. Ĉar estas tro da autoj

Ŝajne ĉe ĉinio oni nur rajtas uzi sian auton unu tago je 2 tagoj.

Mi ne antaŭvidis la problemojn mia komputilo havas uzi la interreton en Ĉinio Parencoj de mia edzino helpis trovi solvon



Saluton Roger,

Dankon, ke vi ankoraŭ laboras por Esperantujo dum vi estas en Ĉinujo.

Por via novaĵletero, mi plusendas afablan mesaĝon de Julian Hernandez, fama esperantisto kaj muzikisto el Kubo.

"Mi deziras al (... kaj) la tuta aŭstralia esperantistaro Feliĉan Novan Jaron. Ni estu sufiĉe komprenemaj, toleremaj, helpemaj kaj amemaj por garantii plian evoluon de nia esperantista movado. Ke 2012 estu jaro de sano kaj prospero. Ni laboru kaj pace batalu por ke la vivo pli ridu al ni, por ke nia ĉirkaŭaĵo estu pli agraba kaj por ke Esperanto pli kaj pli fariĝu internacia lingvo kaj por ke pli da homoj konatiĝu kun ĝi.

Kisojn kaj fortajn brakumojn.

Frate kaj samideane, Julian."

Ĉion bonan al vi kaj Mei,

Hazel (s-ino) Hazel Green

hazgreen@netspace.net.au

<http://kurso.esperanto.org.au>



Ĉiuj melburnanoj kaj vizitantoj al Melburno, ne nur esperantistaj, estos bonvenaj por aŭskulti en la angla lingvo prelegeton, 20minutan, de nia vizitanto el Ĉilio, Dr. Jose Antonio Vergara "Why I'm both a humanist and an Esperanto user - a view from Latin America" . Li prelegos ĉe Melbourne Unitarian Peace Memorial Church, je 11.00atm la 15an de januaro 2012 kaj poste akceptos demandojn dum 10 minutoj antaŭ lunĉo.
Dezirante al vi feliĉan, pacan kaj aktivan novan jaron,
Jennifer <bishop.jennifer699@gmail.com>



De la 1-an de Marto la plej atendita AEA Esperanto Filmkonkurso komenciĝos. La ideo estas simpla, se vi estas profesia aŭ diletanta filmreĝisoro, aŭ aktoro, tiam vi povas partopreni en filmkonkurson por ŝanco gajni 500\$ monan premion. La tutaj detaloj publikiĝos venontmonate, tamen, la projekto ne povas realiĝi sen la helpo de diversaj grupoj, ni bezonas la helpon de volontaj spertaj Esperantistoj. Ĉar plej reĝisoroj kaj aktoroj en Aŭstralio ne regas Esperanton, do por helpi ilin krei siajn filmetojn ni devas trovi tradukantojn kaj konsilantojn. Se povus helpi eĉ iomete, ne hezitu kaj kontaktu nin ĉe informado@esperanto.org.au.
Longe vivu Esperanton!
Riĉardo
AEA Direktoro de Informado

Mi bedaŭras ke la novaĵletero malfruas. Sed interrete Ĉinio ne estas Aŭstralio
Mi povas ricevi mesaĝojn sed ne sendi
Hodiaŭ mi iras al "internet café" kaj eble eblas sendi retmesaĝojn al Aŭstralio"

Mi sendis al vi miaj pensoj pri la Prezidanta Raporto kaj ESK. kam lee

KIALOJ POR LA NEPRESADO DE LA ANGLA ELDONO DE LA PREZIDANTA RAPORTO EN ESK Dec, 2011.

Estimataj amikoj,
la sekvanta artikolo estas nur por privata legado aŭ por tre proksimaj amikoj. Se mia artikolo estas forte subtenata kaj mi ricevos bonajn komentojn eble mi metos la tre kontroverseblan skribaĵon en la forumo. Ekzemplero de la angla eldono kaj Esperanta eldonon de la 2011 Prezidanta Raport estas videbla en la AEA interretejo kaj kelkaj forumoj.

Sandor estas la ĉefredaktoro de la Marta Eldono de ESK. Eble li akceptos la metadon de la Angla eldono de la prezidanta raporto, ĉar li diris, ke li ne havas la energion por batali kun Dianne. Tamen, eble mi povas helpi lin.

kam lee kamleemelburno@hotmail.com